

Bulteno de la Nordfrancia Esperanto-Federacio – Fondita en 1908



La Vorto de la Prezidanto

21an de Novembro 2014

„Unue dankon al ĉiuj membroj de nia Norda Federacio, kiuj partoprenis la 26an Eŭropan Rendeveon en *Stella-Plage* en la tre bela kaj komforta feriejo *Stella-Maris*, apud *Le Touquet*.

Gratulojn ankaŭ al tiuj 85 aliĝintoj, kiuj venis de pluraj landoj por ĝui la riĉan programon kiel kutime bone organizitan de niaj elstaraj *Arlette* kaj *Edmond PLUTNIAK*.

Dank' al jOmO, ni ĉiuj ĝojis kaj kantis, eĉ dancis dum memorebla vespero. Pro tio, kiel li flustris al kelkaj post la koncerto, mi havis la ideon prezenti la diversajn korpopartojn al miaj junaj lernantoj de bazlernejoj, per kanto kaj danco: laŭ la ario „Pata pata de *Myriam MAKEBA*” unue mi petis, ke ili ritme montru siajn kapon, nazon, buŝon, brakojn, orelojn, harojn... kaj poste ke ili dancante movu siajn piedojn, krurojn, manojn ktp.

Vera sukceso por ni lastan sabaton sed ankaŭ grandega sukceso dum la kursoj. Dankegon jOmO!

Post la entuziasma semajnfino en la *Lille*-a metropolo pro la finalo de la *Davis* Pokalo inter Francio kaj Svisio, nia norda regiono povas ege fieri pri la

Sekvo p. 2 • • •

26-a Eŭropa Rendevo en *Stella-Plage* Arte brilis la mara stelo

La 15an kaj 16an de Novembro, en la komforta feriejo *Stella-Maris*, la 84 partoprenantoj el 4 landoj povis elekti inter 4 atelieroj. La komencantoj kaj komencintoj ĝoje laboris kun *Michel DECHY* laŭ interesaj bildoj kaj la albumoj de Tinĉjo. Franjo *LÉVÊQUE* majstre gvidis la koruson de *kant-amantoj*. *Katalin KOVÁTS* preparis la multajn interesiĝantojn, kiuj deziras “esti bonaj helpantoj” dum la venontjara 100-a UK en Lillo. *Pascal VILAIN* kun lia edzino *Mari-Roza* brile gvidis la atelieron pri la vivo kaj la verkaro de Serĝo *ELGO* (*Georges LAGRANGE*), kies 10-an datrevenon de lia forpaso oni omaĝas ĉi jare. Tre kortuŝa estis por ni tiu ateliero: dum 13 jaroj sinsekve, *Georges LAGRANGE* gvidis la literaturan kurson en *Morbecque* dum la pasintaj Eŭropaj Rendevoj kaj *Pascal* kaj *Mari-Roza* interkonatiĝis en tiuj kursoj kaj festas la dudekjariĝon de sia renkontiĝo.

En la sabata posttagmezo, *Katalin KOVÁTS* disdonis la diplomojn al la 9 nordulaj sukcesintoj de la lasta monda KER-ekzameno (trapasita en Araso).



Impona libro-servo de FEL, prezentita de *Katja LODOR* kaj *Hans DELNAT*, allogis multnombrajn aĉetantojn, kiuj provizis sin per aro da legindaĵoj por la venontaj Esperanto-Sumooj.

Eblis aĉeti ankaŭ tre belajn poŝtkartojn kun mirindaj akvarelaĵoj arte pentritaj de *Francine LONGUE-ÉPÉE* (ni varme dankas ŝin pro la donaco de la enspezita mono al la solidarec-kaŝo, kies celo estas venigi nepagipovajn esperantistojn al la Eŭropaj Rendevoj de *Stella*).

organizado de la evento kaj la nekredbla transformado de la impona "Stadio **Pierre MAURY**": parto de la razeno por la futbalo levigis kaj glitis sur la alia parto de la stadio por akcepti, en la libera loko, tenisludejon. Ĉiutage pli ol 27 400 spektantoj (monda rekordo) bone vidis la etan flavan pilkon. Nekredbla etoso kun "ruĝaj" svisoj kaj "bluaj" francoj, ĉiuj kuraĝigis siajn ludantojn sed ankaŭ respektis unu la alian, eĉ kiam ili estis tute "miksitaj". Gratulojn al la svisoj pro ilia venko. La unuan fojon, Svisio gajnis kaj konservas dum unu jaro tiun legendan pokalon.

En nia Esperanta medio, nuntempe, multaj laboras por ke ankaŭ la 100a Universala Kongreso estu grandega sukceso. Ni ne havas la samajn financajn rimedojn, kiel en la tenisa medio, sed ni havas la saman deziron plene sukcesigi tiun magian eventon. Dankegon al ĉiuj, kiuj ŝvitos dum la vintro kaj daŭre ŝvitos dum la printempo por ke ĝi estu belega festo dum la venonta somero.

Bonan kuraĝon ankaŭ al ĉiuj, kiuj gvidos kursojn en niaj kluboj aŭ en diversaj lernejoj, precipe la bazlernejoj dank' al la "novaj lernejaj ritmoj". Oni neniam scias, kiam la semitaj semoj ĝermos. Grandan plezuron al ĉiuj, kiuj partoprenos la diversajn renkontojn okaze de la jarfino. Kompreneble mi deziras al ĉiuj plej agrablan novan jaron 2015 kaj bonan sanon!

La prezidanto Michel **DECHY**



Tre interesa ekspozicio sur 8 paneloj prezentis la gravan rolon de la lingvo Esperanto dum la unua mondmilito (ekspozicio farita de *Espéranto-Bretagne* kaj elŝutita de la retejo de *Espéranto-France*).

Plie, sur la unua etaĝo, apud la lerno-ĉambroj, eblis viziti tri

buntajn artajn ekspoziciojn kun belegaj pentraĵoj de *Francine LONGUE-ÉPÉE*, *Joëlle MULLER*, *Anne DUPECHAUD* kaj grandaj skulptaĵoj de *Alain CHALM*, belaj pupoj de *Hélène MAZZEGA* al kiuj aldoniĝis fotoj kaj poemoj de *Pascal VILAIN* kaj la mirindaj juvelkreaĵoj de *Katalin KOVÁTS*.



En la sabata vespero, jOmO brile kaj energiplene koncertis kaj eĉ dancigis nin en la granda plenplena kaj entuziasmigita salono. Poste en nia knajpo, ĝis noktomezo, kelkaj invititaj gastoj libere kajmanis ajnlingve aŭ pollingve kun nia elstara poliglota kantisto dum la esperantisto gaje esperantumis kun glaso enmane.

Dimanĉe matene, post frua ellitiĝo kaj finstudado, la turismemuloj povis viziti la banurbon *Le Touquet* aŭ piediri ĝis la strando de *Stella-Plage*. La katolikoj povis partopreni sanktan meson en la lingvoj franca kaj esperanta memore al nia kara

amiko kaj samideano *Richard SZLASKI*, forpasinta la pasintan semajnon. *Lucy ADAM*, la plej fama kantistino de la nord-franca poldevenularo akompanis la liturgiajn kantojn kaj per sia tre bela voĉo tremigis la korojn en la ĉarma apuda kapeleto.

La posttagmezo estis dediĉita al la furora ludo **RISKO**. Du parizaj partoprenantoj, *Anne JAUSIONS* kaj *Aleks KADAR*, gajnis la belan koloran diplomon ellaboritan de *Jean HENNEBERT* kaj la premiojn donacitajn de edukado.net.

La koruseto regalis nin per tri belaj internaciaj kantoj majstre plenumitaj trivoĉe.

Allogis nin al partopreno en la venontjara Konferenco de *ILEI Flory WITDOEKT*; ĝi okazos en Ostendo unu semajnon antaŭ la UK. De tie eblos tre facile veturi al Lillo.

Julia HEDOUX brile prezentis la urbon Lillo kaj tiean venontan jubileon 100-an UK-on, kies aliĝilon vi povas elŝuti, plenigi kaj tuj sendi al *Espéranto-France*, nepre antaŭ la 31a de Decembro, por profiti de la favora prezo. Certe ankaŭ vi dezirus esti helpanto en tiu historia evento, do senprokraste informu *Julia*-n.

Reveninte hejmen jOmO retumis: *"Mi volas danki vin pro la amika etoso kaj akcepto en Stella-Plage. Bela renkontiĝo, kun belaj artaj ekspozicioj! Estas sufiĉe malofte en Esperantujo. Jam flugis en aero en Stella-Plage antaŭodoro de UK en Lillo!!!"*

Raportis Edmond **PLUTNIAK**



La Nordfrancia Federacio en UFE kaj UEA

OKTOBRA KOMITATKUNSIDO DE UFE EN PARIZO

La 8-an de Oktobro 2014

En antaŭa kunveno de la sabato 11-a de Oktobro, kelkaj komitatanoj – inter kiuj mi estis – partoprenis diskuton pri tri temoj pridiskutotaj la morgaŭon dum la komitata kunsido.

1 – Kion vi farus, por Esperanto, se vi havus 100 000 eŭrojn ?

Prezentis la aferon la Prezidanto *Axel ROUSSEAU*, laŭ la kvar sinsekvaj ŝtupoj (Publiko, Lernantoj, Esperantistoj, UFE). Mi ne dubas, ke ĉiuj niaj federacioj estas koncernataj (!), kiel mi (!). Kaj sekve mi intervenis por diri, ke “Jes mi devas interveni ĉiuokaze: por prikanti la avantaĝojn de Esperanto; por kontribui al la vivo de la movado en oficialaj organizaĵoj; por gvidi kursojn en diversaj medioj... Kaj feliĉe tio ne kostas 100 000 €!”.

2 – Ekspozicio 1914-18 (Agado de Esperanto dum la unua mondmilito)

Claude NOURMONT parolis pri prelegoj jam faritaj pri tiu temo kaj pri afiŝoj haveblaj por elmontri la agadojn faritajn. Estas certe, ke niaj lokaj grupoj povas – kaj devas – sin informi pere de *UFE*, por akiri tiajn afiŝojn kaj por organizi en siaj lokoj prelegojn al neesperantistoj.

3 – Prelegturneoj. (Difino kaj komento de proponoj de *Yves NICOLAS*)

Alex KADAR resumas tion ; kaj ĉiuj konsentas pri la ĉi-sekvaj decidoj :

- 1) La nombro de turneoj ne superu 4 ĉiujare ;
- 2) Ĉiu turneo daŭru pli ol 18 tagojn kaj malpli ol 1 monaton, kun minimuma daŭro je tri tagoj en ĉiu klubo ;
- 3) Por pagi la kostojn, ĉiu koncernata klubo antaŭpagu 20 € ;
- 4) Kiel poŝmonon al la preleganto, ĉiu klubo vizitata donu 15 € por

sia turneo ;

- 5) La kostoj de vojaĝo (alveno en Francion kaj reiro) estu pagitaj laŭ ĉiu aparta kazo (*au cas par cas*).

Tiuj tri problemoj estis aparte pridiskutitaj, kaj ties konkludoj aprobitaj dum la dimanĉa komitata kunsido. Certe ĉiuj niaj Nordaj kluboj estas koncernataj...

Dimanĉa kunsido de la komitato

Ĉeestis inter 15 kaj 20 gekomitatanoj ; kvino da aliaj rajtigis iun por ilin reprezenti.

Por nia federacio ĉeestis: *Julia HEDOUX* ; *Xavier DEWIDHEM* ; *Michel DECHY*, nia prezidanto... kaj mi mem.

Prezidis *Axel ROUSSEAU*, kaj protokolisis *Alex KADAR*.

Mi raportas ĉi-sube pri la temoj, kiuj vere povas koncerni kaj interesi niajn federaciojn kaj tial esti pristudataj de ili.

1 – Administrado kaj Financoj.

Pri la interna regularo: ne kreigiĝis ŝanĝiĝo. Notu, ke la antaŭa federacio “*Esperanto – Île-de-France*” fariĝis “*Esperanto – Paris – Île-de-France*”.

Pri la novaj membroj: multaj membriĝis post sia emeritiĝo. Ni instigu ilin al aktiveco, ekzemple per sendo de artikoloj por *LME*.

(Kompreneble artikoloj por la Norda Gazeto – al mi sendotaj – estos ankaŭ bonvenigitaj de mi!...)

La membraro entenis 545 kotizantojn en 2013 kaj 640 en 2014. Por novaj abonantoj daŭros la tarifo je 8 €.

Pri la “Francaj Interasociaj Kotizoj” (teorie interesaj por malpliigo de

ENHAVO

ASOCIAJ TEMOJ

Fede ★ Arte brilis la mara stelo	p1
Fede ★ UFE-komitata kunsido de Oktobro	p3
E080 ★ Agadraporto de Amieno	p4
E080 ★ En <i>Burkina Faso</i>	p5
ArE ★ Agad-raporto el Araso	p5
ArE ★ Omaĝo al <i>Szlaski</i>	p6
BuE ★ Agad-raporto el Bulonjo	p6
DuE ★ Agad-raporto el Dunkirko	p7
LVE ★ Agadraporto el <i>LVE</i>	p7
VaE ★ Agad-raporto el Valencieno	p8
VaE ★ <i>Gustave CRAUK</i>	p8

impuestoj, sed ŝajne komplike aplikeblaj por la Norda federacio, ĉar modifigantaj niajn federaciajn kaj klubajn tarifojn) estos denovaj klarigoj en la retejo de “*Esperanto-France*”. Ni daŭre parolu pri tiu ebleco en niaj kluboj.

Pri novaj “*Membrolibroj*”, iu laborgrupo pristudas la aferon depost *Chambéry*. Tio ja estas gravaĵo por ĉiuj membroj.

2 – Projektoj

Pri la kampanjo “*Esperanto au Bac*”, la afero lamas depost nia interveno al la ministro pri instruado.

Nun estas nova ministro; sed tamen ne estas ŝanĝiĝo de la situacio... Tamen ni kolektis pli ol 30 500 subskribojn de la peticio!

Ni daŭre parolu pri Esperanto. Ni ne ĉesu rilati kun la ministro.

Pri instruado en la lernejoj. Mi memorigas, ke *Michel DECHY* en *Villeneuve-d'Ascq* kaj mi mem en mia vilaĝo *Bersée* gvidas kursojn al deko da “*CM2*”-anoj. Niaj emeritaj Nordanoj nepre devas provi iniciati tiajn kursojn!...

Pri ekspozicioj pri la “*Granda Milito*”, vi vidu la ĉi-supran paragrafon.

Same pri tio, “*kion vi farus se vi*

3 – Kongresoj

En la UK de Bonaero partoprenis *Xavier DEWIDHEM*, *Aleks KADAR*, *Claude NOURMONT*, *Michel DECHY* (kaj lia edzino).

Ili organizis budon pri "UK-Lille2015" dum la nun tradicia "Asocia Foiro" kaj havis konstantan budon dum la tuta kongreso.

Michel DECHY partoprenis ankaŭ en la renkontiĝo de Montevideo.

En la fino de tiu 2014-UK, *Xavier DEWIDHEM* laboregis por efike prezenti – kun granda sukceso – nian "UK-Lille2015". Raporton pri lia interveno li faris en la Oktobra numero de nia gazeto.

Ni ĉiam pretas akcepti bonvol-emulojn pretajn helpi por la disvolvo de nia UK...

Pri la nacia kongreso de "Espéranto-France", estas antaŭvidita en Parizo simpla du-aŭ-tri-taga renkontiĝo por ĝenerala membrokunveno kaj komitata kunsido. Sen turisma-kultura

aranĝo, sed kun ebla vizito de muzeo. Dato = 8-a de Majo.

4 – Instruado kaj ekzamenoj

Pere de **FEI** trapasis ekzamenojn en 2014 nur 10 kandidatoj, inter kiuj kvar en Lille kaj kvin en Plouézec... Necesas trovi por **FEI**: delegiton de **UFE** (*Sylvain BANIER*); kaj direktoron de la ekzamenoj.

Pri la KER-ekzamenoj, ni povas pri-kanti la sukceson de la tutmonda sesio de 2014 – aparte en Araso. Por la tutmonda sesio de 2015 necesas organizi tion (espereble en Araso denove!) sufiĉe frue por ebligi, ke *Katalin* povu disdoni la diplomojn dum la UK de Lille.

5 – Eksteraj rilatoj Informado kaj komunikado

Estas konfirmitaj la konsiltoj donitaj en nia antaŭa numero de nia Norda Gazeto pri la gazetara komunikado: Pri notindaj eventoj (KER-sesio, UK Bonaero,...), estas oportune sendi al *Didier LOISON* artikolojn, por ke li povu sufiĉe frue informi la gazetojn.

Pri la prelegturneoj, vidu la decidojn de la sabata laborgrupo; konformaj al la sugestoj de *Yves NICOLAS*.

Pri "Fête de l'Humanité" kaj "Expolangues" (5-7-aj de Februaro), en 2015 deĵorontaj volontuloj facile troveblas en la Pariza regiono. *Espéranto-France* partoprenos en 2015 en *Expolangues*... Verŝajne en sama budo kiel "Mondalinga".

6 – Eldonado kaj butikoj

Michel DECHY starigas denove la problemon de la stokado de bildstriaĵlibroj (Tinĉjo en Tibeto, ktp.) en netaŭgaj lokoj, kie estas danĝero de atako de musoj, se ne de inundo!!... Tiu problemo estas nepre solvenda okaze de la venonta komitata kunsido.

Reportis *Claude LONGUE-ÉPÉE*
Delegito de la Norda federacio
en la **UFE**-komitato

El Amieno

Agad-raporto el Amieno

La kursoj

La 3 diversaj renkontiĝoj organiziĝas kiel antaŭdiritaj kaj bone okazas.

Ne estas instruistoj en la grupoj. Nur tri grupoj kiuj laŭ niveloj elektis tri diversajn manierojn kune labori.

Ekzemple:

- Unu preparas artikolon de la revuo **Monato** kaj legas al la aliaj kiuj komentas kaj tradukas.

Por la "Norda gazeto", *Thérèse-Marie* preparis raporton pri restado en *Burkina Faso* kadre de asocio.

La grupo helpis ŝin redakti la raporton

- Alia grupo komencas interesan

laboron pri la esperanta verkado de *Günter*.

Renkontiĝo en Stella-Plage

Naŭ personoj partoprenis la renkontiĝon de *Stella-Plage*. Dum tiu konveno, *Arlette* kaj *Edmond* transdonis propramane la kvar diplomojn al tiuj de nia grupo kiuj sukcesis la ekzamenojn.

Projektoj

- Por la "Norda Gazeto", ankaŭ *Agnès* kaj *Maryse* faros raporton pri sia restado en Kamerunio. Kadre de asocio, ili restos kelkajn semajnojn en orfejoj. Kiel por *Thérèse-Marie*, la grupo helpas ilin redakti la raporton

- Kelkaj samideanoj de nia grupo partoprenos la internacian kongreson en Lille. Pluraj el ili intencas helpi je la organizo de la kongreso.

- Du esperantistoj de nia grupo (*Jean-Claude* kaj *Vincent*) bonvolas ĉiĉeroni dum la vizito de *Amiens* organizota por partoprenantoj de la kongreso.

Redaktis *Marie-Thérèse FRENOY*
kaj *Maryse DEVIS*

El Amieno

Restado en Burkina Faso



Filleules au foyer



Pompe au foyer

Kadre de la aktivajoj de la Asocio "Ŭuvres du Sahel au Burkina Faso", mi patronas Mariettou, knabinon kiu vivas en Burkina Faso.

Dum la pasinta monato, kun mia edzo kaj aliaj francoj, mi vojaĝis al Mēgué, kiu situas en Nord-Cameroun. Tiu restado ebligis, ke mi povis vidi, kiel disvolviĝas la vivo de la de ni patronataj gejunuloj.

Ĝenerale la geknaboj vivas tre malproksime de siaj normalaj lernejoj. Tiu nia helpasocio ebligas la studojn de la lernantinoj en pensiono, kiu situas proksimume je nur tri

kilometroj for de la lernejo. Ili tiel povas iri piede al la lernejo.

Antaŭe la asocio prizorgis la gejunulojn. Nun ĝi prizorgas nur junulinojn, kiuj pli suferus pro tiu antaŭa nenormala malegaleco.

La junulinoj devas sukcesi en siaj studoj. Ili rajtas nur unu fojon ripeti iun klason.

La vivo estas, por tiuj junulinoj, fakte ege rudimenta kaj malfacila:

- Por duŝi sin ili devas preni akvon el sitelo per plastbotelo.
- Estas nur unu truo por iliaj necesaj bezonoj... Tamen feliĉe en fermita loko!
- Ilia nutraĵo estas kuirita ekstere sur lignofajro.
- Ili dormas duope en ĉambreto.

Malgraŭ tiuj specialaj vivkondiĉoj sufiĉe malfacilaj, ili estas pli komfortaj



Rencontre avec les filleules

ol ili estus hejme.

Tiu loko de edukado eblas danke al mono regule donacita de francaj patronoj (ĉiu patrono pagas 220 € ĉiujare).

La asocio helpas al la junulinoj ĝis ties abiturienteco.



Collège

La asocio estas fiera kaj feliĉa pro la bonaj kaj sukcesaj rezultoj (kuracisto, instruistino, ekonomiisto, ktp.).

Por pligrandigi la monrimedojn, ĉiujare, en Francio, la asocio organizas festajn manifestaciojn, aŭ vendojn de ĉe privatuloj manfaritaj objektoj.

Raportado kaj ilustrado de Thérèse-Marie FRENOY

Redaktado de Thérèse-Marie FRENOY, Bernadette MANIER, Maryse DEVIS, Françoise JAISON

El Araso

Agad-raporto el Arras-Espéranto

14-an de Septembro: Okaze de la renovigita "Forumo de Asocioj", en kiu ni prezentis Esperanto-budon, la organizantoj oficiale

enmanigis al Arlette kaj al mi belan Honoran Diplomon (Bidasse 2014!) pro nia multjara bonvola (senpaga!) laboro sine de la asocio Arras-

Esperanto. Notindas, ke ĉeestis pli ol 100 asocioj kaj nur 10 personoj estis premiitaj (ni kaj nia asocio povas fieri!!!).

15-an de Septembro:

Rekomenciĝis nia lunda kurso en "Office Culturel d'Espéranto" 61, Grand'Place, ĉeestas averaĝe inter 14 kaj 18 lernantoj (ni havas du pliajn lernantinojn).

7-an de Oktobro:

Sekve de peto de profesoro pri filozofio en la literatura abiturienta klaso de la liceo *Gambetta* en Arras, *Arlette* kaj mi prezentis la lingvon Esperanto al du grupoj de 15 lernantoj. Ĉe la fino, post disdono de la Esperanto-kalendarretoj, venis trafa demando de liceanino: "Kial en la liceo oni ne instruas al ni tiun belan lingvon?"



8-an de Novembro: Duhora intervjuo de nia prezidanto *Didier TOULLER* fare de la ĉefredaktoro de la gazeto "L'Echo du Pas-de-Calais". Espereble sekvos favora artikolo en la Decembra numero de tiu bonega gazeto, kies eldonkvanto estas 600 000 ekzempleroj.



15-16-an de Novembro: 15 membroj aliĝis al la 26-a Eŭropa Rendevuo de *Stella-Plage*. Deko da membroj regule partoprenas la ludon Esperanto-Sumoo iniciatitan de *HORI Jasuo* kaj gajnas belajn kolorajn diplomojn.



22-an de Novembro: Kune kun dudeko da solidarec-asocioj, partopreno en la Tago de la Solidareco en la urbodomo de Arras.



1-an de Decembro: ni plenigis ĉiuj kune la aliĝilon al la 100-a UK de Lille, kun promeso sendi ĝin senprokraste al la sidejo de *Espéranto-France*. Multaj inter ni estos helpantoj dum tiu historia evento.

Raportis *Edmond PLUTNIAK*

El Araso

Funebra omaĝo al **Richard SZLASKI**

Kara amiko kaj samideano Rikardo,

En la nomo de ĉiuj membroj de *Arras-Espéranto*, *Oignies-Espéranto* kaj de *Espéranto-Nord*, ni prezentas al vi lastan adiaŭon.

Vi eklernis la Internacian Lingvon post la Federacia Kongreso en Arras, dum kiu vi bele kantis en la koruso *KALINA*, ni tiam celebris la jaron de Pollando en nia regiono. Unu kanton via koruso kantis en Esperanto: "Iris knabineto..."

Profunde impresis vin la belsoneco, la precizeco de la Internacia Lingvo. Ankaŭ tre kortuŝis vin la amikaj rilatoj inter ties parolantoj (tion vi diris al ni poste).

Unue en la klubo de *Oignies*, kaj poste en *Arras*, vi estis ĉiam la modela lernanto. la ajn estis la

vetero, vi devis veturi de *Courrières* en horoj plenŝtopitaj de trafiko. Vi neniam plendis, vi neniam malakuratis.

Vi ĉiam akceptis viajn samklubanojn kun amika rideto, anekdoto, bela nova vorto aŭ interesa esprimo lernitaj dum la semajno. Hejme, ĉiutage, vi legis en Esperanto... "kun plezuro!" emis vi aldoni. Vi sciiis parkere bele deklami Esperanto-poeziojn, proverbojn kaj eĉ preĝojn.

Rapide vi iĝis bona esperantisto, vi brile trapasis la eŭropajn ekzamenojn kaj iĝis diplomito de la fama Universitato *Elte* de Budapeŝto.

Kun granda sindonemo vi ankaŭ animis, kuraĝigis kaj instruis la Esperanto-amikaron de *Oignies*. Kiom ofte vi alportis al ni belajn

donacetojn, kiujn vi tute aparte elektis por ĉiu el ni.

Ĉiuj kiuj konis vin neniam forgesos viajn profundan amikemon, afablecon kaj sindonemon.

Dum nia venontsemajna 26a Esperantista Eŭropa Esperanto-Rendevuo, meso estos celebrata je via memoro en la lingvoj franca, pola kaj Esperanta: dimanĉon 16-an de Novembro, je la 11a horo, en la bela kapelo *Stella-Maris* en *Stella-Plage*.

Ripozu en Paco !

Legita esperantlingve de *Arlette PLUTNIAK* kaj franclingve de *Edmond PLUTNIAK* en la preĝejo de *Courrières* la 6-an de Novembro 2014

El Bulonjo-ĉe-Mar

Agad-raporto el Bulonjo-ĉe-Mar

En Bulonjo-ĉe-Mar, dum la kongreso de "La Sociétés Savantes" ni ĝuis tre interesan prezentadon de Esperanto, rilatantan pri la movado.

Mi mem, kun miaj lernantoj,

klarigos pri Esperanto al la Asocio "Les Amis de Charles Dickens", venontan Februaron.


Ni kunvenas ĉiumerkrede. Kaj *Jane*


kaj *Maryse* partoprenis la rendevuon en *Stella-Plage*.


Raportis *Marie-Jeanne LINE*

El Dunkirko

Agad-raporto el Dunkirko


 **La 17an de Septembro 2014**, okazis la informkunveno de *Dunkerque-Espéranto*.

 **Sabaton la 28an de Oktobro**, rekomenciĝis niaj rendevuoj (unufoje ĉiumonate).

 **La 15an kaj 16an de Novembro**, unu klubano (*Xavier*) partoprenis la 26an Eŭropan Rendevuon de *Stella-Plage*.

 **Sabaton la 20an de**

Decembro, la klubanoj kune vespermanĝis en restoracio – en Dunkirko – okaze de la tradicia Zamenhof-festo.

 **Sabaton la 21an de Marto 2015**, nia asocio *Dunkerque-Espéranto* starigos budon en la 11a Salono pri la Lingvoj en la interurba komunumdomo de Dunkirko, proponita de la asocio “*Association pour le développement des langues sur le littoral dunkerquois*” (ADLLD). Ĉirkaŭ 1 500 vizitantoj povos ekkoni

 la agadojn de la klubo.


En Aprilo 2015, kelkaj klubanoj (eble) partoprenos la federacian kongreson de nia Federacio *Espéranto-Nord*.

Merkredon la 01an de Julio 2015, okazos la 23-a ĝenerala membrokunveno de nia asocio, en la kutima kunvenejo “*Brossolette*”.


Raportis *Xavier VILAIN*


El Lille-Villeneuve-Espéranto > METROPOLO


Agad-raporto el LVE

 **Ĉiusemajnaj kursoj**
Bersée: ĉiulunde, 7 partoprenantoj en “supera lernado” [Instruisto *Claude LONGUE-ÉPÉE*].
Lille: ĉiun trian mardon, en la Kvartala Domo en la centro de *Lille*, 5 “praktikantoj”; kaj ĉiun alian trian mardon, unu aŭ pluraj komencantoj [Instruisto *Katja BOEN*].
Universitato *Lille III*: ĉiumarde, 2 aŭ 3 komencantoj; kaj ekde Novembro dufoje monate lunde por ĉirkaŭ 7 progresantoj [Instruisto *Michel DECHY*].


TAP aŭ NAP: Fakte tiuj akronimoj laŭ la elekto de la urboj, kiuj zorgas pri la lernantoj pro la “novaj lernejoj ritmoj”: 8 lernantoj de klaso *CM2* en *Bersée* [*Claude LONGUE-ÉPÉE*], 8 en *CM1* en *LA FONTAINE* kaj 9 lernantoj en *CM2* en *PRÉVERT* en *Villeneuve-d'Ascq* [Instruisto *Michel DECHY*].

 **Universitato pri Libera Tempo**
Almenaŭ dekfoje vendrede matene dum 2 horoj por 3 komencantoj [Instruisto *Michel DECHY*].


 **La klubo ĉe Interreto**
www.lve-esperanto.org
Multaj informoj pri la diversaj agadoj de nia klubo aperas en tiu bonega informilo.
Sufiĉe ofte homoj kaj ĵurnalistoj kontaktas nin post vizito de tiu “fama” adreso, kies zorgantoj estas *Katja BOEN* kaj *Xavier DEWIDHEM*.

 **Prelegoj kaj prezentado de la lingvo Esperanto**
Ĉiujare la elementaj lernejoj (*Anatole FRANCE* kaj *Pablo PICASSO*) invitas min. Mi kutime proponas almenaŭ 3 seancojn po 1h30 (Prezentado de Eo, kurso pri matematiko en Esperanto kaj fine Japana Sorobano).

Sabate, la 29-an de Novembro en la urbo *Douai*, mi prelegos pri Esperanto invitate de asocio de homoj, kiuj ricevis la palmordenon, do verŝajne kleraj instruistoj ...

 **Babilrondo**
Ĉiumonate okazas, ĉijare en librovendejo *V.O. 53, strato Molinel* apud la stacidomo de Lillo, babilrondo, laŭ la ludo “*Brin de Jasette*”


(Babilero). Laŭvice, ĉiu parolas laŭ temo elektita en aro da ludkartoj. Dankon al *Laurent ZIBELL* kaj *Caroline HUYARD*, kiuj iniciatis kaj gvidas tiun agrablan vesperon.

 **Budoj okaze de diversaj aranĝoj**
• Esperanto budo ĉe la stratbazono de *Lille*, la 6an kaj 7an de Septembro dank' al *Vincent PEINGNEZ*.

• Foiro pri Asocioj, la 14an de Septembro en la vastega sporthalo “*Palacium*” en *Villeneuve-d'Ascq*, de la 10-a ĝis la 18-a horo. Bonega momento por reklami kaj varbi!

• Festivalo pri la Bildstrioj en *Lys-lez-Lannoy*: la 8-an kaj la 9-an de Novembro 2014 [*Michel DECHY*].

Dankon al ĉiuj deĵorantoj kaj vizitantoj!

 **Lille2015, Universala Kongreso okazos en Lille**
Xavier DEWIDHEM prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, emocije ricevis la verdan flagon de niaj

argentinaj amikoj lastan someron. Multaj el nia klubo helpos: Katja **BOEN** responsas pri la

ekskursoj, **Claude LONGUE-ÉPÉE** ĉiĉeronos, **Michel DECHY** responsos pri la Infankongreso...

Bonvenon al ĉiuj!

Raportis **Michel DECHY**

El Valenciano

Agad-raporto el Valenciano

La kursoj

La kursoj okazas en la "Domo de la Asocioj" en Valenciano:

– 1-a grado: ĉiun jaŭdon, je la 10-a h ĝis la 12-a h kun 4 gelnantoj (gvidas: **Jean MACKÉ**).

– 2-a grado: ĉiun sabaton, je la 10-a h ĝis la 12-a h kun 4 gelnantoj, (gvidas: **Jean DIETRICH**).

La 15-an kaj 16-an de Novembro, tri membroj de

Valenciennes-Espéranto partoprenis en la 26-a Eŭropa Rendevo de "Stella-Maris".

Raportas **Jean-Marc FRATARD**

El Valenciano

Gustave CRAUK

Enkonduko de la tradukinto

Eltiritaĵo de la libro "Famuloj de Henegovio".

Speciala numero aperinta okaze de la 30-a datreveno de la libro, en Oktobro 2013, eldonita de la Genealogia Asocio "Flandrio-Henegovio" (*Généalogie et Histoire "Flandre-Hainaut"*).

Estis tradukita kun la afabla rajtigo de la Prezidantino Sinjorino **Maryse BOUDART**, kiun ni varme dankas. Rajtigo estas donita al ni publikigi eltiraĵojn en niaj revuoj.

Enkondukis **Jean DIETRICH**



Crauk skulptanta la buston de **Gustavo Eiffel**

venis loĝi en *Douchy* (kie naskiĝis iu frato Karlo, kiu estos pentristo) kaj en Valenciano, kie li oficis kiel duaranga kirurgo en la tiea hospitalo.

Tre juna, ekde 1838, Gustavo imitas la ekzemplon de sia frato unue naskita, ĉe la Valencianaj Akademioj. Juliano **POTIER** kaj **GRANDFILS** estas liaj majstroj.

En 1845 li foriras al Parizo; li iĝas lernanto de **RAMEY** kaj **DUMONT**; li estas akceptita en Oktobro en la Belarta Lernejo; kaj li ricevas stipendion de sia naskiĝurbo.

Lernanto de **PRADIER** en 1847, li gajnas en 1851 la Unuan Grandan Rompremion pri skulptarto por "La Grekoj kaj la Trojanoj luktas por ekhavi la korpon de Patroklo".

Li estas tiom pli festita en Valenciano, ke li remalfermis la pordon de la Vilaio *Medicis*, fermita por la Valencianoj de tridek jaroj.

Gustavo **CRAUK** foriras al Romo la 26-an de Januaro 1852. Tuj post la reveno en Parizo, li komencas tre brilantan karieron de oficiala skulptisto kaj ŝatata portretisto. Nelacigebla kaj regula laboranto, li estas en la ateliero, ĉiutage kaj ĝismorte de la oka kaj duono ĝis la dek-sepa horo, manĝante surloke. Li multobligos la bustojn, el la marmoro skulptitajn aŭ el la bronzo fanditajn, de siatempejam famulojn, de siaj amikoj aŭ de siaj samfamilianoj.

Tiel oni malfacile povas verki la historion de la dua duono de la deknaŭa jarcento, ne elvokante **CRAUK**-on pri lia portretaro kaj portretarto: Marŝalo **PELISSIER**, duko **DE MALAKOFF**, Marŝalo **DE MAC MAHON**, Duko de **MAGENTA**, Imperiestro **Eugénie**, Fraŭlino **FAVART**, **Antoine BRASSEUR**, **Edmond ABOUT**, **Jules** kaj **Paul MARMOTTAN**, estas enkalkulitaj inter liaj modeloj; same kiel **Marguerite GONDON** lia edzino, aŭ **Karlo Alix DUBOSC**, modelo preferata de la Belarta Lernejo.

Al tiuj portretoj, kiuj povus sufiĉi al lia gloro, Gustavo **CRAUK** aldonis multe da statuoj, kiuj ornamas publikajn placojn kaj religiajn konstruaĵojn: Norda stacidomo en Parizo, **Douai** kaj **Dunkirko** (1854); "La Doloro" por la tombo de S-ino **BECHARD** en la tombejo "Père Lachaise" (1864); la

kuŝstatuo de *Marie LANTOINE* en la tombejo de *Pecq* (1901); la frontono de la manufakturo de *Sèvres*; tiu de la paviliono de *MARSAN*, sur la strato de *Rivoli* ((1878); la grupo de la Tritonoj de la baseno de la Placo *MÉDICIS* (1879); la monumento al la Admiralo *DE COLIGNY* ĉe la absido de la Templo de la Oratorio sur la strato de *Rivoli* (inaŭgurita la 17-an de Julio 1889); la statuo de Petro *GIRAUD* ĉefepiskopo de *Cambrai* (en la katedralo de *Cambrai*, 1888); Nia Damo de la Paco (Baziliko de *Montmartre*, 1897); la Maŭzelo de la Kardinalo *LAVIGERIE* (Baziliko de Kartago, 1899) aŭ ankoraŭ la Monumento pri la Defendo de Valencieno en 1793 (inaŭgurita en Majo 1902).



La monumento al la Admiralo DE COLIGNY

Ĉiuj tiuj verkoj atestas la mirigan fekundecon de artisto obeanta nur al sia inklino, tute klasika, influita de la lecionoj de *PRADIER* kaj de granda sincereco antaŭ la naturo. Vundite pro la malsukceso de sia kandidateco al la Instituto (estas *FALGUIERE*, kiu

kapablis alligi al si la plejmulton), *CRAUK* tamen fariĝis Oficiro de la Honora Legio en 1878, kaj Komandoro en 1903.

Li havis la grandegan kontentigon inaŭguri je la 27-a de Majo 1902, en Valencieno, la muzeon *CRAUK*

(hodiaŭ malaperintan), kie estis la plej famaj el liaj verkaĵoj, kun la kolektoj de liaj memoraroj.

Forpasinte en *Meudon* la 16-an de Novembro 1905, li kuŝas flanke de sia edzino en la tombejo Sankta *Roch* en Valencieno sub la ombro de la Maŭzelo, verko de *Henriko GAUQUIE* kronita de la bela "Kapo de Kristo", al kiu li dediĉis siajn lastajn fortojn. Gustavo *CRAUK*, kiu ŝatis sin deklari "La lasta de la klasikuloj", verŝajne suferis pro la neevitebla komparo kun lia samtempulo *CARPEAUX*, kies genion li ne havis. Lia verko, integra, solide fondita, ilustranta tutan duonan jarcenton, liaj bustoj nutritaj de profunda konscio de la homa animo, indas ke oni re-konsideru tiun belan talenton.

Verkis *Jean-Claude POINSIGNON*
Tradukis esperanten *Jean DIETRICH*

Traduko

ADIAŬ AMIKINO!

Enkonduko de *Claude LONGUE-ÉPÉE*

Ĉu vi memoras pri tiuj fortaj tirĉevaloj, kiuj laboris sur niaj nordregionaj kamparoj, kuraĝe tirante ĉarojn, plugmaŝinojn, sarkmaŝinojn, rikoltmaŝinojn, ktp.? Certe restas en niaj farmobienoj malmulte da tiuj fidelaj kaj laboremaj bestoj.

Jam por nia "Norda Gazeto", mi elektis kaj tradukis artikolojn verkitajn de iuj membroj de mia "Bersée-a Rondo de memorantoj", pri la nun pli malpli malaperintaj aktivecoj: en karbominejo; en sukerfarejo; por rikolto de betsemoj; per kuraciloj de niaj avinoj.

Nu! Jen ĉi-sube artikolo de alia membro de mia "Bersée-a Rondo de memorantoj", kiu ĉeestis iun eventon ligitan al la malapero el nia regiono de niaj amikoj: la tirĉevaloj.

Enkondukis *Claude LONGUE-ÉPÉE*

Artikolo de *Francis LEDENT*

Ah! Kiom ŝi estis bela en sia ŝamkolora robo, kun sia longa blonda kolhararo kaj sia eleganta eta frango surstrekanta siajn longajn okulharojn! Ŝi estis *Farah*, la bulonja ĉevalino de la najbara farmulo.

Ŝi konsistigis belan skipon kun sia filino *Stella*, kiu estis iomete pli blonda... Per sia potenco, farita el okcent kilogramoj da muskoloj, ili faris ĉiajn laborojn sur la kamparo, la pezajn kaj severajn laborojn same kiel la plej delikatajn, kviete obeante

la ordonojn de sia "carton" (t.e. ĉevalgvidisto). Fidelaj kaj obeemaj, ili estis disponeblaj ĉiutage laŭ sama trankvila kaj serena ĉeesto.

Estis plezuro vidi ilin dum ilia fortostreĉo, kiam ili eltiris el la kampo la ĉaron peze ŝarĝitan per tritikgarboj aŭ per terpomoj. Hu! Hu! Je la foririga signalo ili sin kontraŭstreĉis, tirante la koljungaĵon per ĉiuj siaj fortoj.

ENHAVO

NIAJ MEMBROJ VERKANTAS

★ Adiaŭ amikino!	p9
★ <i>Trailwalker</i>	p11
★ Oni estu bonkora	p12
★ Multkoloroco	p13
★ Kreado de baza unueco en multkultura Eŭropa Unio	p14
★ Atentigo de la redaktoro	p15

La starto estis malfacila; ili surtretis per siaj kvar piedoj, per ĉiuj siaj streĉataj muskoloj, kun la ŝvelantaj naztruoj blovanhelante... Kaj hop! La jungitaro ekmoviĝis...

La "carton" gvidis ilin, per la rimeno de la "lanier" (t.e. gvidiloj) en la maldekstra mano, kun la dekstra mano sur la timono, por kontroli la direktiĝon de la ĉaro. Necesis ne malsukcesigi la eliron el la kampo kaj taŭge regi la turniĝon sur la ofte mallarĝa vojo. Tio estis momento de braveco, por la bestoj kiel por la homo.

Por la laboretoj, la ĉevalo posedis la ĉiel eblan delikatecon necesan, por atente ne surtreti la plantaĵojn dum la "ramontelage" (t.e. parta kovrado per tero de la plantaĵoj) de la poreoj aŭ de la terpomoj, aŭ dum diversaj sarkadoj. Ĉiuj tiuj taskoj plej bone efektiviĝis, ĉar estis bela kunkulpeco inter la homo kaj lia laborkunulo.

Tiuepoke mi estis knabeto, kaj mi ŝatis akompani sur la kampoj Roger, la filon de la farmulo. Mi alte taksis la revenon de la kampo, sidante "à cru" (t.e. sen selo) sur la dorso de la ĉevalo. Mi sensis inter miaj kruroj la moviĝojn de la muskoloj de la besto. Mi tiel profitis iun promenon kvietan laŭ la trankvila kaj trankviliga ritmo de la besto.

En la farmobieno ni formetis la koljungaĵojn kaj kaporimenojn; kaj, tenante la ĉevalojn per ties brido, ni kondukis ilin al la paŝtejo.

Tuj kiam ili estis liberigitaj, la du ĉevalinoj ekkuris laŭ senbrida galopo, dissaltante tien kaj ĉi-tien, fiere levante la voston, disfurzante kaj disfekante. Tio estis ilia momento de feliĉo kaj de libereco post longa tago de laboro. Ni alportis al ili kelkajn sitelojn da akvo kaj ilian manĝaĵon. Ili sciis, ke ni havas en la mano kelkajn pecojn da sukero, kiel frandaĵon; por ricevi tion, ili puŝis nin per sia nazo, ilyaj lipegoj rapidis kapti la frandaĵon en nia manplato.

La ĉevalo estas konsiderata kiel



"la plej bela konkeritaĵo de la homo"...

La intima ligilo kuniganta la homon kaj la beston estas pli ol jarcentaĝa...

Tamen, dum la jaroj 1950 kaj sekvantaj – epoko de la "Sputnikoj" kaj de iu fulmrapida progresado de la teknikoj – la ĉies vivo modifiĝis rapidege.

La vapormaŝinojn anstataŭis la elektraĵoj aŭ dizelaj lokomotivoj... La traktoro kaj ĝia eksplodmotoro rapide anstataŭis la ĉevalon...

Kaj tiel plu...

La kampara mondo devis adaptiĝi al tiu mehanizado. Tiam estis periodo de la malordigado de la jarcentaĝaj kutimoj. La kultivistoj estis incitaditaj de koncesiuloj, kiuj provis vendi siajn famajn traktorojn. Ĉiuj estis de ĉi-specaj kaj de ĉiedevenaj firmaoj: germana, franca, brita...

Kion fari?... Eĉ en la familioj estis debatadoj, ofte viglegaj, inter la generacioj. La junuloj estis allogitaj de la novaj teknikoj, la maljunuloj estis pli dubemaj kaj ili hezitis. Krome, necesis amortizi la novan maŝinaron!...

Fine, en la najbara farmobieno, same kiel en la aliaj farmobienoj de la vilaĝo, alvenis la traktoro brilege nova. La tuta familio admiris ĝin kaj volis ĝin provi, por malkovri ĉiujn ĝiajn eblecojn.

Sed tio nova alveninto estis kreanta disŝanĝiĝojn de la organizado de la vivo en la farmobieno. Por la kampa laboro necesis provizi tutan serion da

adaptitaj iloj. Necesis malpliigi la laborkostojn kaj taŭge elekti.

Tial oni devis rezignacii vendi la ĉevalojn.

La pli juna de la ĉevalinoj havis la feliĉon esti akiritaj de alia bieno.

Male, al la patrino ŝia aĝo ne lasis alian eblecon ol la senfeligejo.

Ve! La tago de la foriro tre rapide alvenis. La senfeligisto metis en la korton de la farmobieno sian bestveturilon kaj malfermis ties malantaŭan pordon...

Ĉiuj ĉeestis por lastfoje saluti Farah

Constant, la patro de la familio, estis staranta, brakkrucante; dum la malfacilaj momentoj, li emis balanci la kapon kaj la korpon antaŭen kaj malantaŭen, li frotis sian mentonon elmontrante tre gravan internan moviĝadon. Kiam alvenis la ĉevalino, li ne kapablis resti kaj li foriris rifuĝi en angulon de la garbejo.

La besto trankvile eniris la veturilon, sciante nenion pri sia estonteco. La pordo de la besttransportilo refermiĝis. Kaj tiam, dum la daŭro de unu momento, dekkvin jaroj de amikeco kaj de kunestado brutale forstrekiĝis... Por transformiĝi en okcent kilogramojn da viando.

ADIAŬ LA AMIKINO!

Dum kelkaj jaroj la kampara vivo rapide transformiĝis.

luj malgravaj "Censiers" (t.e. farmistoj) ne povis preterpasi tiun revolucion. Ili forlasis siajn kampojn.

Al la fabriko, al *Béghin*, aŭ al *Gevaert*, aŭ al "la fosse" (t.e. la minejo).



Verkis Francis **LEDENT**
Alesperantigis
Claude **LONGUE-ÉPÉE**

Atesto de sportisto

“Trailwalker”: Cent kilometroj dum tridek horoj



Kvinope, ni bonŝancis sperti tiun faman eventon. Kio estas “Trailwalker”?

Temas pri aranĝo regata de internacia organizo “OXFAM”; tio estas akronimo, kiu signifas: “Oxford relief against FAMine”. Jam de pluraj jaroj la “Trailwalker” (= PadMarŝanto) okazas en diversaj naciaj branĉoj de tiu “ONG” (= Ne Registara Organizo), cele al kolekto de mono por ties propraj aferoj, t.e. baraktado por pli da justeco en la Tria Mondo: ĉefe lokaj agadoj por disvolvado kaj por pledado al altrangaj instancoj.

En Francio, ĝi okazis kvin fojojn depost 2010, ene de la regiona parko *Morvan*, dum unu printempa semajnfino. Laŭ centkilometra signalita vojo ĉirkaŭ la urbo *Avallon* (ankaŭ: *Seaulieu*), dekoj da kvaropaj teamoj varbiĝas por piede “gluti” centon da kilometroj dum malpli ol tridek horoj; paralele tiuj teamoj trofekonkursas, por esti rekoltintaj monsumon je minimume 1 500 €. Do la afero celas kaj travivas du malfacilajn defojn:

- Fizika evento: tio kio postulas intensan trejnadon kaj bonhumoran solidarecon ene de ĉiu teamo; verdire jen taŭga ekzerco por pludaŭrigi nian junecon!
- Financa klopodo: tio kio postulas diversajn reklamagadojn al gefamilianoj kaj amikaj rondoj kaj iaj ajn publikuloj konsciemaj pri la TriaMondaj temoj de OXFAM. Jen ja tikla ekzerco, pli postulema ol la unua!

Praktike, ĉiu teamo, arigite laŭ loka

aŭ amika deveno kaj maskite de amuza teamnomo^(*), registriĝas kelkajn monatojn antaŭ la evento (en 2015 ĝi okazos la 6-an kaj 7-an de Junio) sur la *TrailWalker*-a retejo (<http://www.oxframtrailwalker.fr>).

Intertempe ni havas kelkajn monatojn je nia dispono, por:

- Arigi grupeton da subtenantoj, kiuj helpos nin praktike kaj morale ĉu dum ĉu antaŭ la okazaĵo.
- Trejniĝi pere de ekskursoj ĉe nia ĉirkaŭaĵo; tiaj ekskursoj okazis, po unu ĉiumonate, plej kaj plej longdistancaj; kaj eĉ okazis dumnoktaj ekskursoj; la lasta interligis du katedralojn, de *Amiens* ĝis *Beauvais* laŭ la praa Romia ŝoseo, tio estas 63 km!).

- Aranĝi kelkajn financocelajn klopodojn, t.e. interalie vendi “aktivistajn korbajn” enhavantajn diversajn frandaĵojn faritajn de ni mem, kaj inviti al ark-aktivista vespero animata de amikaj muzikistoj niaj; ĉi-lasta vespero ebligas disvastigi la temojn de la OXFAM-a kampanjo kaj finance plenumi la trofekonkursan celon... Uf!!



matenmanĝi.

Sabato, je la 7-a h, proksimuma milo (= 232 x 4 + multaj responsuloj) da partoprenantoj ekmarŝas sur la zorge balzumita vojo. Sensunas la vetero, sed tamen bonhumoras la etoso. La densa grupo longiĝas laŭ la rapideco aŭ la irstrategio de ĉiu teamo – mi aldiru, ke ne temas pri konkurso!

Post 17 km, jen unua haltejo: nutrado, trinkado, irado al necesejo, ŝanĝo de ŝtrumpetoj, vtp. Tiel sep aliaj haltejoj estas sur la vojo, en kiuj oni povas eĉ kuŝiĝi por kelka tempo dum la nokto – kvankam niaopinie,

preferinde estas pludaŭre marŝi laŭ la tuta distanco ne dormante.

Impresa marŝado tra arbaro laŭ vojo balzumita per lumaj ŝildoj! Mirinda pejzaĝo dum la tagiĝo, kiam aŭtomate funkcias la kruroj kaj duonvekitaj funkcias la menso!

Finfine ekestas ĝojplena malpeziĝo dum la alveno en *Avallon*, ĉirkaŭ la 11-a h, de la kompleta teamo sen forlaso, dum aplaŭdas la subtenanta homamaso!

La ĉi-jara kampanjo, trapasita de pli ol 232 teamoj, rikoltis 420 460 eŭrojn. Ja verdire tio estas ne eta sumo, kiun ni kuraĝe meritis, kaj kiu konkrete helpas la OXFAM-an movadon por ĝiaj agadoj. Do ververa sukceso!

Sed tamen, oni malbonhumorigas, kiam oni komparas tiun modestan rikolton kun la grandegecon de la rimedoj plu mankantaj por daŭre helpi la Trian Mondon...

Ve! Ĉu oni konscias pri la kosto de nur unu tago de milito??...

Kompreneble, la “TrailWalker” kuntrenas realan strebon; sed bonvole ni konsentas elporti tiun strebon, en bonkora etoso.

Aliflanke, ni nepre kompatu al la situacio de tiom da rifuĝintoj, Kiuj laŭmarŝas senfinajn distancojn, Maltaŭge vestitaj de ŝuaĉoj, Kun malsato en la ventro kaj angoro aŭ malamo en la koro, Perforte forpelitaj el siaj hejmoj, Fitraktitaj de rabemaj transpasigistoj, Malbonvenigitaj de armitaj doganistoj...

Traĝikaj mortoriskaj statoj, por pluvivi... Benitaj ili estu!

Verkis **Vincent COUROUBLE**, aktiva marŝanto

(*) Ekzemple la miaj estis: “*quatre sans*” (2010), “*tri komo tridek tri*” (2011), “*cent kilomètres pour survivre*” (2012), “*chès marcheux picards*” (2013), “*avallons les kilomètres*” (2014).

ONI ESTU BONKORA

Pri simpla instruistino **JANG**, kies bonkoreco igis ŝin morti.

Enkondukaj citaĵo de kanzonisto

"Tiom multe da homoj, kiuj iam diris 'ne' en morton malaperis oportune, Liaj korpoj forfandiĝis, Nek iliajn okulojn nek eĉ nomojn oni memoris, Iliaj vortoj restas. Kaj nun ili ĝustas.

Nekonato la veron diris: Oni lin ekzekutis."

Guy BÉART



"Nju-Nju, Ĝu Kiang, kiam vi estos plenkreskuloj, vi estu bonkoraj. Eĉ se tia entrepreno estas aŭdaca kaj malfacila, oni estu bonkora." (instruistino **JANG**)

Tiuj paroloj ŝajnos banalaj bonsentaj paroloj. Tute ne. Oni tiel kredas ĉar oni ne konscias, kiom fakte tio estas ja vera, kiom vere estas ja aŭdaca ambicio esti bonkora, kaj kiom tio estas ja malfacila; kaj danĝera, eĉ foje tre danĝera...

La juna virino, kiu tion eldiris estas sur la foto. Tiu foto estas la nura spuro, kiu restas nun pri ŝi. La knabineto estas *Nju-Nju. Nju-Nju* estis infano kiam eksplodis la fama "Kultura Revolucio" (kiu fakte estis nek kultura, nek revolucio).

Ŝi poste sukcesis eliri el Ĉinio kaj ŝi verkis sian membiografon, sub la titolo "Neniom da larmoj por *Mao*": rakonto pri terura kaj malfeliĉega infanaĝo de knabino dum la "Kultura Revolucio".

Ŝia avo estis buĉita sub ŝiaj okuloj far la "Ruĝaj gvardianoj". Ŝia patro kaj ŝia patrino estis senditaj en reedukadokoncentrejojn. Ŝi estis oficiale taksita "filino de krimuloj".

Se tiu biografio ne estus, pri ŝia memoro nenio restus. Dank' al *Nju-Nju* restas ia memoro, kaj restas

tiuj vortoj, restas tiu – pli-profunda-ol-oni-pensas – admono.

Kelkajn semajnojn post sia feliĉa promeno kun sia plej-amata lernejanino, la instruistino **JANG** estis krude arestita antaŭ siaj lernantoj meze de lernseanco. Kaj estis aranĝita seanco de "kritiko" kontraŭ ŝi. Sed ŝi estis tiom amata de siaj lernejaninoj, kiom ŝi amis ilin.

Kaj jen kion ni povas legi en la verko: "Sur la voj-angulo ni ĵuris ne timi pri la reagoj de niaj gepatroj aŭ pri la malagrablaĵoj, kiuj sekvontus de la de ni projektita faro: neniaokaze diri ion ajn malbonan pri nia koramata profesoro. Tiu, kiu rompus la ĵuron estus forpuŝita de la aliaj.

La tago alvenis. La tuta ĉeestantaro kaj la efekta ĉeesto de la gepatroj malardigis nian decidemon. Kaj, nu, estis profesoro **JANG**.

Ŝi staris en la pozicio, kiu estis tiu de miaj geavoj: kun la manoj ligitaj sur la dorso, kaj kun tabulo pendanta ĉe ŝia kolo, sur kiu estis skribite "mal-revoluciuolo". Oni estis razinta de ŝi duonon de la kranio, por signifi, ke ŝi plu estus nur duono de persono, feĉo de la homaro.

Post tiom malmulte da tempo, ŝi ŝajnis esti maljuniĝinta je pluraj jaroj.

La patro de *Ĝu-Kiang* anoncis, ke de nun la profesoro pri desegno estros la lernejan establon.

(La patro de *Ĝu-Kiang* mem estis grava estro de la "Kultura revolucio" en la urbo: *Ĉeng-du*)

Ĉiu instruisto estis eldirinta sur la supro de la podio sian denunc-artikolon. La plej longa parolado estis kompreneble tiu de la fiaĉa estrino. Dum la aŭskultado restis ni kun la kapo klinita. Kaj ni restis silentaj, kiel

antaŭdecidite. Komencis la profesoroj maltrankviliĝi pro tio, sed jam estis tro malfrue.

– "Ĝelernantoj ja diru ion!"

Ni daŭre estis serenaj. Kaŝridoj infektiĝis laŭ niaj vicoj: laŭmerite al tiuj profesoroj!

La fiperfidulino malleviĝis de la podio, kaj iris al ni por alparoli la klasĉefon:

– "Ĉu vi ne skribis denunc-artikolon? Do iru sur la podion por ĝin legi!"

Ne lasinte al li nur sekundon por pripensi, ŝi tiris lin je la maniko.

Li tremadis ĝis ĉiuj membroj sub niaj severaj rigardoj. Li ne rajtis diri ion malbonan pri profesoro **JANG**, kiu estintis ĉiam afablega al li.

Li malfaldis folion, rigardis al nia profesoro, sin turnis al la aliaj instruistoj kaj al la Ruĝaj Gvardianoj sidantaj en la fundo de la podio. Subite li elmontris kuraĝon, kiu mirkonsternis nin ĉiujn, deklarante laŭtvoĉe:

– "Mi ne konas tiun tekston! Mi ne scipovas legi ĝin! Ne mi skribis ĝin, ties ideografiaĵojn mi ne komprenas."

Kia genio! Ni ĉiuj ekaplaŭdis lin, kaj nia kara **JANG** levis la kapon por rideti al ni, tamen plorante.

Tiun rideton ni konadis parkere, sed je tiu-ĉi tago ĝi estis tiom patosa, ke ĝi tordigis al ni la ventron. Ni vespiradis per "Profesoro **JANG**!" ĥore.

Sed el ni *Ĝu-Kiang* manifestiĝis la plej riskema. Li eldiris abrupte:

– "Profesoro **JANG** neniam diris ion malbonan en la klasĉambro!"

Lia patro stariĝis, ruĝega pro kolero:

– "Silentu tuj! Se vi plu diras ion ajn mi draŝos vin hejme!"

Mia amiko tuj residiĝis.

Sed la profesoro pri desegno estis jam hontiĝinta antaŭ la patro de *ĜU-*

KIANG, kaj kliniĝis antaŭ ĉi-tiu, skuante la kapon, kiel farus hundo antaŭ sia mastro.

– “Pardonu al mi estra Moŝto **ĜU**, pri tio mi kulpas, mi ilin ne bone informis. Ne koleru! Mi plu forpurigos la venenon, kiun **JANG** estas metinta en iliajn mensojn.

– “Ja vi kulpas, tio estas fakto! Vi estu baraktonta, por reeduki ilin ĝisfunde. Tiu kunveno tute ne kontentigas min! Oni faru iun alian novan!”

Laŭ nia bontrovo la kunveno estis finiĝanta kontentegige: tio estas en diabla fuŝordo!

Ĉiuj foriris, krom **ĜU-KIANG**, restigita de la profesoro pri desegno. La kolegoj atendis lin sur la strateto. Fine ŝi nur sugestis al li, ke li petu pardonon de sia patro.

– “Ĝi insultis vin, ĉu?”

– Ne! Ĝi ne aŭdacis, ĉar dank’ al mia patro ŝi iĝas la estro de la lernejo.

– Ĉu li draŝos vin?”

– Ĉiuokaze mia patrino malhelpos lin tion fari!”

Ni poste demandis la klasĉefon, ĉu veras, ke la denunci-letero ne estis skribita de li. Li respondis ke ja tio estis fakto. La profesoro pri desegno estis veninta preparoli kun liaj gepatroj:

– “Ĉar mi estis la klas-delegito, mi estis tiu, kiu denunci profesoron **JANG**. Ŝi lasis al ni la artikolon, kiun ŝi estis verkinta. Mi ne volis ĝin legi, kaj panjo donis al mi la ideon diri, ke mi ne komprenas ties ideografiaĵojn.”

La kunveno nia finiĝis kun niaj petegoj al **ĜU-KIANG**, ke ĉi-tiu persvadu la patron, ne aranĝi novan kunvenon.

La kunveno ne okazis, sed profesoro **JANG** ne plu aperis en la lernejo.

Diritis, ke ŝi memmortigis sin. lun matenon la lernantoj niaklasaj alvenis al la kursoj kun la okuloj ŝvelitaj kaj ruĝaj, kaj kun naztuko en la mano.

lun posttagmezon **ĜU-KIANG** vokis min:

– “*Nju-Nju*, ĉu vi volas iri, por vidi profesoron **JANG**? Ne estas blago. Ili faris grandan kunvenon.

Venu sekvu min...”

Ekkuris ni anhelante ĝis la eks-teatro. De la salonfundo vidiĝis silueto sidanta sur seĝo meze de la scenejo. Ni kuregis al ĝi. Ĝi estis nia amata profesoro **JANG**. Senmova kaj sen-



esprima, ŝi tenis la palpebrojn fermitaj. Ŝia haŭto estis blanka kiel papero. Logis kaj samtempe timis min rigardi tiun vizaĝon, kiu estis doninta al mi tiom da amo kaj da feliĉo. Ŝi estis tiom ŝanĝiĝinta, ke mi ne plu tre bone rekonis ŝin.

– “Profesoro **JANG**! Ĉu vi dormas? Estas mi *Nju-Nju*. Ĉu vi aŭdas min? Mi venis por vidi vin. Vekiĝu kaj mi faros ĉion, kion vi ordonos al mi”.

Mia gorĝo strangoliĝis, **ĜU-KIANG** tremadis per la tuta korpo, dirante:

– “Min pardonu, profesoro **JANG**. Vi ŝias, ke mi malamas mian patron, mi malamas min mem. Profesoro **JANG**, vi estas revenonta ja? Denove, ni

trapromenos la parkon triope, ĉu ne?”

Ni tiam surgenuiĝis, kun la kapo sur ŝiaj genuoj malvarmaj, plorante ĝis la sufokiĝo. Ni malestimis nin pro nekapablo dronigi plene la tutan urbon per niaj larmoj. Ni malamegis nin pro nia nekapablo per niaj krioj eksplodigi la teatron. Flustris **ĜU-KIANG**:

– “Mi opinias, ke profesoro **JANG** tre malvarmas!”

Sen preparado ni nin direktis al la propagandaj kaj akuzaj afiŝoj, kiujn ni forŝiris po unu ĝis la plej lasta kaj ni kovris per ili profesoron **JANG**, tute, por ke oni ne plu ŝin vidu. Kaj tiam ni lokis nin apud ŝi, kvazaŭ borde de roko por spekti sunsubiron.

Kelkajn tagojn poste, onidiroj aŭdiĝis, ke polico estis serĉinta ĉie tiujn, kiuj aŭdacis ŝiri la afiŝojn pri propagando, por per ili kovri krimulon kies kadavro estis ĵus rekrutikita. Ni feliĉis pro tio, ke la polico fiaskis en sia enketo.

Plurajn laŭvicajn vesperojn ni plu forŝiris afiŝojn sur la strato: tio estis nia ununura rimedo venĝi la morton de profesoro **JANG**. Ni kredis, ke ŝi loĝadas sur la luno ekde tiam, kaj ke ŝi kontentas de tie rigardi al ni.

Mia avino instruis al mi, ke en la mondo estas iuj koroj kaj okuloj neelĉerpeble bonaj. Iam tiuj konsumos la malbonecon de la mondo. Ankaŭ mi estis utiligonta mian malgrandan koron, por kontraŭstari al la malico por mia avo, por mia ‘fraĉjo Ĝibulo’ kaj por mia tiom kara profesoro **JANG**.

Tradukis kaj prezentis
Roland PLATTEAU
1-an de Februaro 2003

Distra laboro de junuloj

MULTKOLORECO

Enkonduko de **Claude LONGUE-ÉPÉE**

La ĉi-suba teksto estas uzita – kiel rektmetoda instruilo – de la aŭtoro

Michel DECHY, por instrui Esperanton al ge-**CM1-CM2**-anoj, en du bazlernejoj de sia urbo *Villeneuve-d'Ascq*, kadre de la “Nova

Organizado” de la hortabeloj de la bazaj lernejoj. Kiel kursgvidanto, *Michel DECHY* prezentas la diversajn kolorojn al

siaj kursanoj en la ĉi-suba teksto, petante, ke ili faru kolorigitajn desegnojn.

Krome, li starigas kelkajn demandojn en Esperanto:

Dezirinte ĜOJAN KRISTNASKAN FESTON, FELIĈAN NOVAN JARON kaj BONAN SANON!

Li demandas:

- Multaj agrablaj festoj okazas fine de la jaro! Kiun feston vi preferas?
- Kiun donacon vi dezirus ricevi okaze de tiuj festoj?

Li parolas pri:

- Avo Frosto, Norda Poluso, Kanado, **HOH OHO.**

Li deklamas la ĉi-sekvantan tekston, petante ke la lernantoj faru desegnon laŭ la taŭgaj koloroj.

Enkondukis

Claude **LONGUE-ÉPÉE**



Multaj steloj brilas en la ĉielo, ankaŭ la luno brilas,

La unua stelo estus **ruĝa** kiel bona koro aŭ bongusta pomo,

La dua stelo estus **blua** kiel somera ĉielo aŭ mont/ar/a lago,

La tria stelo estus **flava** kiel valora oro aŭ acida citrono,

La kvara estus **blanka** kiel vintra mateno aŭ polusa urso,

La kvina estus **verda** kiel printempa herbo aŭ esper-simbolo,

La sesa estus **oranĝa** kiel matura mandarino aŭ nederlanda flago,

La sepa estus **nigra** kiel varm/ig/a karbo aŭ nokta kato promenanta,

La oka estus **viola** kiel aŭtuna vinbero (*raisin*) aŭ melongeno (*aubergine*),

La naŭa estus **bruna** kiel "eta urso" aŭ mal/nova arbotrunko,

La deka estus **bunta** kiel bela ĉielarko aŭ sudamerika karnavalo.

Verkis Michel **DECHY**



Teksto pri Eŭropo de nia ĉeĥa samideano *Jaroslav KARHAN*

KREADO DE BAZA UNUECO EN MULTKULTURA EŬROPA UNIO

Pri HOMEKOLOGIO, por krei bazan unuecon en multkultura Eŭropo

Por venkado de restaĵoj de historia malfido kaj diversaj negativaj manifestiĝoj inter nacioj kaj inter etnaj grupoj en la Eŭropa Unio (EU). Kaj krome, antaŭen por evoluado de harmonia kunvivado kaj de fruktodona kunlaborado, inkluzive de facila lingva interkompreniĝo inter ĉiuj ĝiaj civitanoj, necesus kulturi en EU novan, tuthomaran vivstilon, notatan **Homekologio**. Ĝi estas sintezo de universala etiko kun universala lingvo, surbaze de ideoj kaj

verkoj de du elstaraj Eŭropanoj: Johano Amos **KOMENIO**, titolita "Instruisto de nacioj", ĉeĥa teologo kaj pedagogo (1592–1670), kiu en siaj verkoj por plibonigo de la aferoj tuthomaraj (precipe en "VOJO DE LUMO" el la jaro 1642) rekomendis unuecan, tuthomaran, bazan, universale etikan edukadon per universala lingvo, kiu devus esti nove kreita tiel, ke ĝi estu perfekta kaj ke tamen ĉiuj homoj kapablu ĝin facile ellerni apud sia lingvo gepatra.

D-ro Ludoviko Lazaro **ZAMENHOF**, pioniro de tuthomara harmonio kaj de unuiĝo de Eŭropo (pola kuracisto, 1859–1917), kiu ĝuste tian lingvon senprofite kreis, kaj en la jaro 1887 ĝin publikigis sub pseŭdonimo "Doktoro Esperanto" (t. e. Doktoro, kiu esperas); kaj kiu en la jaro 1906 prezentis ĝian sintezon kun elementaj etikaj principoj, en sia verko "Homaranismo", kiel vojon al tuthomara harmonio kaj tutmonda paco.

Dum la unua mondmilito estis publikigita, en la jaro 1915, lia publika "Alvoko al la diplomattoj", en kiu li i. a. – tuj post la milito – proponis kreon de Unuiĝintaj ŝtatoj de Eŭropo, kun aplikado de ideoj el lia "Homaranismo", por ke analogia milit-tragedio neniam plu povu ripetiĝi. Lia voĉo bedaŭrinde ne estis aŭskultita. Eksplodis ankoraŭ pli terura dua mondmilito.

Homekologio (t. e. "Homa ekologio")

Ĝi estas moderna formo de la postlasaĵoj de ambaŭ tiuj-ĉi elstaraj Eŭropanoj; kaj ĝi povus esti en la Eŭropa Unio kulturata tiamaniere:

Por edukado de junularo

En elementaj lernejoj de ĉiuj EU-membroŝtatoj, envicigi ĝin kiel devigan instruobjekton (per nur unu instruhoro semajne) kun tiu-ĉi metodika divido: en la 2-a klaso instruado de ĝia lingva parto; ekde la 3-a klaso ĝis la lasta klaso, ĝia etika parto, rekte en tiu-ĉi lingvo (komence en formo de pliperfekta lingva kurso). Parto de tiu-ĉi instruado estas reciproka korespondado de lernantoj kun iliaj samaĝuloj en diversaj landoj. Perspektive, la instruado de homekologio povus esti komencita jam en antaŭlernejoj, kie ĝia eduka efekto estus eĉ pli efika. Simpleco de la gramatiko ebligas ĝian instruadon per facila, rapida, por infanoj eĉ amuza, maniero. La sekva etika edukado povus esti komencita per rakontado de fabeloj el ĉiuj nacioj, jam en tiu-ĉi lingvo.

Por plenkreskuloj

Televidoj de ĉiu EU-membroŝtatoj

devus – en reciproka kunlaborado – preparadi kaj elsendadi konstantan televidserion "Homekologio" (po unu horo semajne).

En ĝia unua parto (25 eroj) estus kurso de ĝia universala lingvo.

En ĝia plua parto sekvus, rekte en tiu-ĉi lingvo (komence en formo de pliperfekta kurso), konatiĝado kun tuthomare validaj, moralaj valoroj, entenataj en kulturoj de ĉiuj nacioj kaj etnaj grupoj; kaj universalaj partoj de la instruoj de ĉiuj religioj, en tiu-ĉi sinseko: unue el EU, poste el cetera Eŭropo, kaj finfine valoroj el la tuta mondo.

La serio estus ĉiusemajne kompletigata per aktuala raportado el la "blanka kroniko": pri tuthomare gravaj, tutmondaj okazaĵoj kulturaj, ekumenaj, ekologiaj kaj analogiaj, kiuj estas tuthomare prosperaj. La unua parto (la lingva kurso) povus esti – laŭbezone – realsendata.

En EU evoluiĝus principe nova, harmonia kunvivado de ĉiuj ĝiaj civitanoj, bazita sur universale-etikaj principoj, reciproka amikeco, fruktodona kunlaborado, bazita sur facila lingva interkompreniĝado de ĉiuj kun ĉiuj. La universala lingvo de Homekologio fariĝus do por ĉiuj civitanoj de EU, utila lingva gardilo por facila, digna, internacia interkompreniĝado en kazoj, kiam kono de naciaj lingvoj ne sufiĉus. Kaj ĝi havas eĉ pli gravan valoron: neniu plialtigas, nek humiligas, sed regas ĉies rajtoj kaj ĝenerala lingva demokratio.

Inter ĉiuj civitanoj de EU evoluiĝus elementa unueco en ĉiuj iliaj diversecoj kaj originalecoj, kiuj estos firme gardataj, kaj eĉ plue, konstante,

plenarye kulturataj kaj evoluantaj. EU montrus al ĉiuj nacioj de la tuta mondo, praktikan vojon al internacia fido, tuthomara harmonio kaj tutmonda paco; kio ebligos tutmondan transformiĝon de ĉiuj detruiloj al konstruilojn kaj tutmonde liberigos enormajn valorojn por plibonigo de la kompleksa vivo sur nia unike belega planedo en la Universo: la Tero.

Homekologio estas aktualigita **ZAMENHOF**a homarana koncepto por realigo de lia vizio pri tuthomara harmonio kaj tutmonda paco, esprimita en la Esperanto-himno. Detalaj informoj pri Homekologio kaj proponoj por ĝia tuthomara kulturado, precipe por homekologia edukado de tutmonda junularo, troviĝas sur retpaĝo de la kanada "Hilelista komunumo": <https://sites.google.com/site/roansarts/thinkery/home/esperanto/homekologio>

Realigadon de tiuj-ĉi proponoj povas partopreni ĉiu, laŭ siaj eblaj. Eventuale pluaj – tiacele individuale bezonaj – informoj, estas riceveblaj je la retadreso, publikigita ankaŭ sur tiu-ĉi retpaĝo.

Redaktis *Jaroslav KARHAN*

Diskonigis *Renato CORSETTI*
(Eks-prezidanto de **UEA**)

Raportis *Claude LONGUE-ÉPÉE*
por la Norda Gazeto

El la redakcio Atentigo de la redaktoro



Karaj legantoj. Mi ne scias verdire, kiam vi legos ĉi-tiun numeron de nia gazeto. Sed dum mi redaktas ĝin, mi esperegas, ke vi trapasos tre agrablajn jarfinajn kaj novjarajn festojn!...

Mi ja esperas, ke vi tiam forgesos viajn zorgojn.

Sed tamen mi ankoraŭ nun volas kun vi ekzameni kelkajn el niaj komunaj zorgoj!...

Mi konvinkatas, ke vi interesate

legis la artikolojn entenatajn en nia revuo.

Sed mi miras ricevi de vi nian rimarkon aŭ kritikon.

Ne hezitu sciigi al mi viajn komentojn. Ĉu necesas malfermi en nia gazeto specifajn kolumnojn titolatajn: "Parolas niaj Legantoj"?

Fakte, tutsimple sendu al mi de vi verkitajn (aŭ tradukitajn) artikolojn. Mi ekĝojus esti devigata pliigi la nombron de la revuaj paĝoj. Se necese ni pliigos viajn kotizojn, por kompensi la kroman sendokoston!... Aŭ pli simple mi malpliigos la amplekson de mia "Atentigo"!...

Mi denove insistas, por ke ĉiuj persiste baraktu:

– Por diskonigi nian lingvon, ĝiajn

meritojn, facilecojn, kaj avantaĝojn por la interkompreniĝo de la homoj kaj de la popoloj,

– Por povi tiel kontribui al la varbado de multaj federacioj, kaj de multaj samideanoj, kaj de multaj UFE-anoj, kaj de multaj kotizantoj (!),

– Por ebligi, ke niaj emeritoj profitu sian liberan tempon, por instrui la lingvon al geknaboj (CM1 kaj CM2), por ŝatigi al ili la lingvon kaj ties facilecojn...

Mi instigas vin fari ĉion eblan por diskonigi niajn agadojn, aktive partoprenante ĉirkaŭ vi diversajn manifestaciojn, konferencojn kaj prelegojn, kaj sendante artikolojn al la amaskomunikiloj.

Pri ĉiuj diversaj agadoj, informu ĉiujn niajn legantojn per viaj agadraporto

en la kolumnoj de nia revuo.

Kaj... Por konkludi, mi devas konfirmi, ke mi sensas pli kaj pli la pezon de miaj 83 jaroj sur miaj fizikaj kaj mensaj kapabloj!...

Mi sekve decidis rezigni miajn komisionojn de delegito de la federacio en la UFE-komitato kaj de redaktoro de nia federacia revuo...

Sciu tamen, ke mi daŭre konservas la kontakton – kaj la pagon de mia kotizo – al nia federacio.

... Kaj al vi ĉiuj, miaj samideaj geamikoj, mian ĉiaman amikecon!...

Claude **LONGUE-ÉPÉE**

Asociaj kaj redakciaj informoj

FÉDÉRATION ESPÉRANTO NORD Prezidanto (eldona direktoro de la gazeto):

Michel **DECHY**

65 Allée Crémaillère

59650 VILLENEUVE-D'ASCQ

Tel : 06 16 98 41 02

mdechy@esperanto-nord.org

Sekretario:

Katja **BOEN**

51 Avenue du Maréchal Leclerc

59130 LAMBERSART

Tel : 03 20 92 31 36

cboen@esperanto-nord.org

Kasisto:

Xavier **VILAIN**

Résidence L'Alcyon – Apt. 41

90 rue du Maréchal Joffre

59240 DUNKERQUE

Tel. 06 70 65 93 29

xvilain@esperanto-nord.org

Tarifo de kotizoj:

13 € por plenkreskulo, 8 € por junulo, studento, senlaborulo.

Per ĉeko al la ordo de "Fédération Espéranto-Nord" sendota al la kasisto.

BULTENO "NORDA GAZETO" Ĉefredaktoro:

Claude **LONGUE-ÉPÉE**

320 rue des 4 Bons Dieux

59235 BERSÉE

Tel. 03 20 59 28 80

plongueep@free.fr

Federacia retejo:

<http://www.esperanto-nord.org>

Konstantaj korespondantoj:

★ Amiens

Cyrille **DÉCOUTURE**

kontakto@esperanto80.org

★ Arras

Edmond **PLUTNIAK**

edmond.plutniak@free.fr

★ Boulogne

Marie-Jeanne **LINÉ**

mjline@esperanto-nord.org

★ Dunkerque

Elise **DEPLA**

edepla@yahoo.fr

★ Lille-Villeneuve

Katja **BOEN**

cboen@esperanto-nord.org

★ Valenciennes

Jean-Marc **FRATARD**

jmfratard@esperanto-nord.org

Enpaĝigado:

Cyrille **DÉCOUTURE**

10 chemin des Oiseaux

76270 FESQUES

kontakto@esperanto80.org

Tel : 06 78 80 78 45

Kontrolantoj-korektantoj:

Claude **LONGUE-ÉPÉE**

plongueep@free.fr

Pascal **VILAIN**

p.vilain83@orange.fr

Presado, enkovertigo, sendado:

Richard **VALET**

Rue du Boulenriez 59235 BERSÉE

rf.valet@wanadoo.fr

La teksto de artikoloj estu sendotaj antaŭ la 25-a de Aprilo 2015.

Partoprenis je tiu ĉi numero

Michel Dechy, Claude Longue-Épée, Thérèse-Marie Frenoy, Bernadette Manier, Maryse Devis, Françoise Jaisson, Edmond Plutniak, Xavier Vilain, Jean-Marc Fratard, Jean Dietrich, Vincent Courouble, Roland Platteau.